



# Kajeroj el la Sudo



Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetotekolanti.com/kajeroj/k93.html>



Demografia vintro kaj Tergloba Krizo

La 24-a Internacia Semajno de la Kulturo kaj Turismo

N<sup>o</sup> 93<sup>a</sup>

Januaro 2016

## Redaktore

**D**enove venas ni antaŭ vi kelkajn tagojn post la lasta numero de *Kajeroj el la Sudo*, ĉar ni ne volas, ke denove okazos tio, kio okazis lastan jaron.

Denove vi ĝuos ĉapitron de mia verko *Vivu la Respubliko!*, kiu estis mia unua libro eldonita surpapere. Ĉifoje temas pri Prezidenteco de Respubliko, kaj titoliĝas *La kvar mulistoj*. En tiu alsopirata respubliko hispana, la 3<sup>a</sup>, tio, kio okazas en Katalunio nun ne eblus, ĉar tio ne eblis dum la 2<sup>a</sup>.

S-ro Pina denove regalas nin per sia artikolo *Demografia vintro kaj Tergloba Krizo*, kiun mi trovas interesa, eĉ se kelkaj homoj povas objeti al liaj proponoj. Ĉu estas tro multe da ni? Kion oni povas fari solvi la problemon?

Kiel kutime, ni legas la majstran verkon kaj tradukartaĵon *La Faraono*, de Boleslaŭ Prus', tradukitan de Kabe. Mi decidis korekti kelkajn malnovaĵojn, kiujn la verko enhavas, kaj eble iam mi sukcesos korekti ilin ankaŭ en tiuj ĉapitroj de ni jam publikigitaj pere de ĉi tiu magazino, celante iam publikigi la tutan verkon per aparta surpapera eldono. Eble kelkaj el vi ne aprobos tion, sed la celo aperigi tiun verkon en nia magazino estas por ke novaj esperantistoj praktiku Esperanton.

Ne, vere ne estas nova traduko, sed nova polurigado de senkoheraĵoj, kiuj troviĝas, kiel majuskloj en nomo de landano kaj ankaŭ nomo de ties lando: **fenico** anstataŭ **Feniciano**: se la lando estas **Fenicio**, la nacio estas **fenico**, ne feniciano.

Kiam la magazino jam estis preta, okazis nova politika *tertremo* en Hispanio, ĉar la gvidanto de la plej voĉdonata partio en Hispanio la lastan 20-an de decembro decidis ne reprezidentiĝi, kaj tio kaŭzis multe da akra diskutado en niaj televidoj. Mi mem opinias, ke tio estas tre ruza movo de li, kvankam vere li ne povis fari alimaniere: se la aliaj partioj ne volas kunlabori kun li, li ne havas ŝancon formi registaron, do li nun devas atendi ĝis kiam la aliaj partioj faros ion..., kaj se tio ne eblas, ni denove estos vokitaj baloti. Kaj denove mi petos la nevoĉdonon, pro tio, ke ĉi tio ne estas demokratio. Se oni deziras rememori pri tio, kio



demokratio estas, oni relegu mian libron *Vivu la Respubliko!*, kiun oni povas ricevi kontraŭ du eŭroj surpapere, aŭ nur unu digitale ĉe <http://viewbook.at/respublica>. Pli detalan informon pri tiu verko, kaj ankaŭ fragmenton, oni povas legi ĉe <http://www.obracompleta.com/obras/respublica.html>.

Ĝis baldaŭ!

Vivu la respubliko!

**K**iam ambaŭ ŝanĝoj estis aprobitaj, oni devis elekti la registaron. Kaj liaj amikoj volis, ke li postulu sin por la posteno. Sed li ne volis. Eĉ lia edzino volis, ke li postulus sin, sed li diris ne. Sia loko, li diris, estis tie, kie oni faras leĝojn por honestaj homoj. Kaj li ne volis la postenon de helpanto se li povas esti kun tiuj, kiuj decidas pri tio, kiion oni manĝos. Poste li estis dirita, ke li povus esti Prezidento de la Respubliko, sed li diris, ke tio estus bone, kiam li estus maljunulo. Ĉar Prezidento estas por ricevi *grandajn fiŝojn* kaj ricevi salajregon, sed li povis decidi pri nenio. Kaj li estas kun laboristoj. En parlamento.

Kaj oni elektis iun Jozefon Ludovikon kiel prezidenton de la Registaro. Li estis lerta knabo, kun plenplena da iluzio kaj iomete maldextrema, sed oni povis pardoni lin pri tio ĉar li estis tre ĝentila kaj metis sian koron en ĉion, kion li faris. Kiam li volis fari leĝon pri edukado, Parlamento diris al li, ke li ne povas fari leĝojn, ĉar ili, la anoj de Parlamento, estas tie

## La kvar mulistoj

por tiu laboro. Ili dankos al li siajn ideojn pri tio, se li vere kredas, ke tiuj ideoj estas bonaj, kaj unu el ili, deputitoj, prezentos al la ceteraj parlamentanoj por diskuto kaj aprobo aŭ malaprobo laŭ ĝia ĝenerala konveno. Ili aldonis, ke Prezidento de Registaro estas por regi, tio estas, por



Alfredo Pérez Rubalcaba estas la plej brila politikisto, kiu iam PSOE havis en sia tuta historio.

plenumigi la leĝojn, kiujn Parlamento faras. Tio estas, por obei.

Sed li ne konsentis, kaj li furiozis. Kaj kiam la fervojistoj strikis senmovigante la landon, la Registaro diris, ke ili faros nenion. Tiam Par-

lamento petis de l' Prezidento de l' Respubliko, ke li denove vokos balotadon por Prezidento de l' Registaro, kaj ĉifoje venkis iu Alfredo, kiu estis pli inteligenta, kvankam

de la Respubliko mem, ankaŭ. Tiu Prezidento estis Jozefo Maria, kiuj estis petinta al kelkaj deputitoj, ke ili proponu tion al la cetera Parlamento, ĉar la Prezidento ankaŭ reprezentas la fervojistojn. Kaj tiel la popolo vidis, ke Parlamento servas ĝin, la popolon; kaj ke la Prezidento de la Respubliko deziris fari bonajn agojn, sed li ne kuraĝis.



Jozefo Maria Aznar' estis la plej brila politikisto de PP en ties tuta historio.

malpli bela kaj havis malpli da iluzio ol Jozefo Ludoviko. Kaj Alfredo ordonis, ke oni ne pagu al fevojistoj dum la striko daŭras, kaj ke ili pagos la perdojn, de ili kaŭzitaj al la lando. Sed la Parlamento aŭskultis sindikatojn kaj kiam ili promesis, ke ili konvinkos bone al laboristoj, ĝi pardonis la ŝuldon al ili. Tion Parlamento povas fari, aŭ la Prezidento

Alfredo pruvis, ke li estas bona Prezidento de la Registaro, ĉar li povis fari aferojn, kiujn oni ordonis al li, kaj li faris ilin pli bone ol iu ajn alia. Li deziris iam iĝi Prezidento de la Respubliko, kaj tion malaprobis neniu deputito, kondiĉe, ke li daŭre pruvos sian fidelecon al principoj konstituciaj.

Homoj nun zorgis pri la aferoj de Respubliko. Oni ne volis, ke denove okazu tion, kio okazis sub la regado de la Reĝo, ke la lando preskaŭ detruigis.

LETEROJ AL REDAKTORO.- NOTU, ke oni povas skribi en nia magazino, se oni emas. Se temo interesas al vi, sci, ke vi povas sendi al mi por publikigotio, kion vi verkos.

Simile, ankaŭ ni publikigos tiujn leterojn, kiujn vi sendos al redaktoro por publikigo, tiel ke nia magazino estos ĉies magazino.

## Politikaj paktoj en Hispanio kaj demokratio

Ŝajnas ke nun pakto estas la vorto de la tago laste en Hispanio. Partioj politikaj devas pakti, interkonsenti pri siaj ideologio kaj personoj starigi registaron, por ke la regadon de Hispanio oni garantios. Kaj la partioj kaj la societo interesiĝas tre multe pri la afero.

Tro multe, laŭ mia pensmaniero, ĉar tiu sinteno estas profunde maldemokratia kaj truka: sengrave al tio, kio okazas pri tio, ke la partioj pretigas listojn da kandidatoj, kaj senatente al tio, ke civitanoj ne voĉdonas por individuaj membroj, sed por listoj de partioj prezentitaj, fakto restas, ke estas homoj, kaj ne partioj, kiuj akceptas postenon en parlamento, kaj sekve estas individuaj personoj, kiuj devas agi favore al popolo, kaj ne al partioj, kiel ĉiuj politikistoj faris de kiam tiun memnomumitan demokration ni komencis suferi, je 1978. Bedaŭrinde, politikistoj ne estas, sed partiaj, kaj ĉiam agas favore al siaj partioj, kaj ne al popolo. Tion oni vidas de la starigo eksterleĝa de la koncepto *disciplino de voĉo*, pere de kiu oni devigas deputiton voĉdoni ne laŭ sia konscienco, sed laŭ ordono de la gvidanto de sia partio. Ne gravas, ke oni estu katolika, ekzemple, kaj ke estas voĉdono favora al aborto. Ne gravas, ke oni estu socialisma, kaj la voĉdono estas favore al protekto de

privataj lernejoj kontraŭ publika edukosistemo: tiu, kiu gvidas la partion ŝajne scias pli bone pri kio temas, kaj la *simplo deputito* devas obei kaj voĉdoni tiel, kiel li aŭ ŝi estas dirita. Sed tiuj estas troigaj ekzemploj. La fakto estas, ke deputito

havas la devon voĉdoni favore al plej alta intereso de la civitanaro laŭ sia konscienco kaj lojala scio kaj kompreno, kaj ne favore al sia partio. Partioj metis lin aŭ ŝin en la liston voĉdoneblan, kaj ili ricevis sufiĉe da voĉoj por gajni postenon en la parlamento. Do, bone, dankon. Sed tie devas ĉesi la respondeco de partio al civitanaro. Sed tio ne okazas. Unue, la partio ricevas monon laŭ la nombro de voĉoj, kiujn sia listo ricevis, kaj tio devus esti sufiĉa pago al siaj streboj. Sed ne, ili volas pli. Ili volas daŭrigi sian povon sur parlamento, same kiel gepatroj dezirus kontroli la vivon de siaj gefiloj la tutan vivon. Kaj tio estas eraro.

Parlamento en Hispanio estas tute miksita kun registaro, kaj tio estas eraro. Laŭ nia konstitucio, registaro povas fari leĝon eksterordinare, sed ŝajnas, ke ĉiun tagon venas cirkonstancoj, kiuj kreas urĝan, ne prokrasteblan leĝon. Kaj mi kredas, ke tio estas moko al civitanaro. Tiu, bedaŭrinde, ne interesiĝas pri la



La kvar plej gravaj homoj en Hispanio laŭ balotado

afero, ĉar laŭŝajne ĝi kredas, ke la (mis)agado de parlamentanoj ne influas en siaj aferoj. Sed plialtiĝo de vivo, ekzemple, pruvas male. Malbonaj rezultoj de niaj gelernantoj pruvas male, ankaŭ. Teruraj vicoj en kuracistejoj pruvas male.

Estas vere, ke societo estas tiom demokratia, kiom demokratia estas ties anaro, kaj en ĉi tiu lando homoj ne emas paroli pri politiko, *por ne kvereli*. Bedaŭrinde, oni kredas, ke paroli pri politiko estas paroli pri partioj politikaj, kaj defendi ĉu maldekstro estas pli bona ol dekstro, ĉu tiu politikisto estas pli bona ol ĉi tiu, aŭ tiu alia. Eskapas al ilia penso, ke politiko gravas pli ol politikistoj, kaj ke politiko estas tio, kion politikistoj faras dum civitanaro sindemandas kiu estas la plej bona, la plej bela, aŭ la plej honesta. Tiujn aferojn oni devas scii antaŭ oni voĉdonas, kaj se oni ne vidas, ke ili estas honestaj kaj efikaj (aŭ almenaŭ oni kredas tion), la sola honesta eblo estas ne voĉdoni, same kiel oni ne eniras negocon, se oni ne kredas, ke oni povas gajni ion. Sed voĉdonoj ŝajnas esti io sengrava, kiun oni povas disdoni al nekonatulo, por ke li ludu laŭ sia ideologio. Ŝajnas, ke kaj deputitoj kaj voĉdonantoj ne scias, ke la kialo por parlamento estas servi la popolon, ne servigi ĝin al partioj politikaj.

Nun ŝajnas, ke ni ĉiuj diskutas pri la plej eblaj paktoj inter la diversaj partioj politikaj de Hispanio, ĉefe Civitanoj, Podemos, PSOE kaj PP. Se al tiuj partioj gravus la bonfarto de la civitanaro, la du lastaj paktus fortan registaron, sed ŝajnas, ke ili nur celas profiton al siaj propraj

partioj kaj al ties ideologioj. De ĉiam la registaron en Hispanio celis devigi sian ideologion al civitanaro, kio estis la ĉefa objekto al la diktatoreco de Generalo Franko. Sed mi trovas, ke la hodiaŭaj partioj, supozeble demokratiaj, faras ekzakte same, kiel oni vidas pri edukado: kiam venas al registaro nova partio, la leĝo pri edukado ŝanĝas, kaj eĉ oni petas, ke estu interkonsento inter partioj pri tio. Tio estas esence maldemokratia, maljusta kaj malefika, kaj pro tio niaj gelernantoj rikoltas la plej malfavorajn rezultojn laŭ la PISA Raporto. Registaro devas fari efikan, ne ideologian leĝon pri Edukado, kaj oni devas ŝanĝi ĝin nur se oni konstatas, ke edukado en Hispanio ne estas efika pro la leĝo, kiu estas la kazo nun. Geinstruistoj devus esti aŭskultataj kaj iliajn konsilojn oni devus akcepti kaj laŭleĝigi. Sed ŝajnas, ke politikistoj ne volas rezigni eĉ atomon de povo, eĉ se ili ne scias kion fari per ĝi.

Pro tio, evidentiĝas, ke sengrave al tio, kio rezultas en balotado, paktoj inter partioj ne estas necesaj: ĉiuj parlamentanoj devas ĉiam elekti la plej bonan decidon favore al civitanaro laŭ siaj konscienco kaj scio, ne laŭ ordono de sia gvidanto. Ne devus esti gvidantoj en parlamento, sed sincera diskutado. Kaj ĝis kiam venos pli demokratia konstitucio, la Prezidenton de la Registaro oni devas elekti tie laŭ lia aŭ ŝia bonaj kvalitoj por la posteno, kaj ne pro la situacio ene de la partio politika.

## Kio okazas en Katalunio?

**M**ultaj hispanoj zorgas kun timo pri tio, kio okazas en Katalunio pro tio, ke nun estas sendependisma homo kiel Prezidanto de ties hispana aŭtonomio.

Mi kredas, ke ne estas kaŭzo por timo, ĉar mi dubas, ke katalunoj vere celos sendependismon. Se ili tion decidas,

araboj, en la oka jarcento, kaj tiu franca, en la deknaŭa, sed ne tiu hispana, ĉar Katalunio estis unue aragona (ĉar ĝi apartenis al la Krono de Aragono) kaj poste hispana, kiam imperiestro Karlo 1<sup>a</sup> heredis kaj Kastilion kaj Aragonon el siaj geavoj Fernando kaj Isabel'. Evidente, dum la Rekonkero de la lando al araboj, estis



Puçdemont



Mas

laŭ mi, oni devus lasi ilin foriri, kaj poste peze kondiĉigi sian revenon, ĉar laŭ mia eltrovo, Katalunio estas nenio sen Hispanio.

Katalunistoj (oni devas diferencigi inter ili kaj katalunoj) ripozigas sian argumentaron sur mensogoj kaj ignoranteco pri historio. Tion kaŭzis la senzorgemo de hispanaj registaroj de ĉiu koloro lasinte edukadon en manoj de aŭtonomaj registaroj. Ili uzis edukadon ideologiigi gelernantojn, kaj ili ja kredas, ke iam armeo hispana invadis *la sanktan patron, Katalunion*, kiu ĝis tiam estis sendependa, same kiel baltaj respublikoj estis invaditaj de rusa armeo. Sed la solaj armeoj, kiu iam invadis Katalunion estis tiu de

kelkaj sendependaj kristanaj regnolandoj, sed ili neniam estis tiuj, kiuj sinnomigas hodiaŭ kiel historiajn aŭtonomiojn, Katalunion, Vaskion kaj Galegion. Oni povas pensi pri Kastilio mem, kiu fakte estis kelkaj regnolandoj (Leon', Asturio, Kastilio), Valensjo, Nafaro, kaj eĉ Mursjo, kvankam ĝi estis sendependa regnolando araba, kaj tuj kiam kristanoj konkeris ĝin, araboj estis forpuŝitaj de la lando, kiun repopulis aragonanoj, kaj estis aldonita al reglando de Kastilio, same kiel Vaskio, Andaluzio kaj Kanariaj Insuloj.

Aliflanke, tio, ke peco da lando regis homoj sendependaj al aliaj homoj ne signifas, ke tiuj landoj estis

sendependaj, kaj certe ne la homoj, kiuj vivis tie. Ĝis 1978 ne estis demokratio en Hispanio (tiel diri), kaj sekve ne ekzistis civitanoj liberaj, sed nur subuloj. La monarĥio je lastaj jarcentoj ja povis esti pli-malpli rajtodonaj al subuloj, sed ili ja ne havis la eblecon elekti la reĝon, kaj sekve li reprezentis Dion, sed ne la popolon. Popolo ne estis libera en iu ajn parto de Hispanio, krom tiuj vivanta en Cádiz (pron. kadiz) dum la franca invado je la 19<sup>a</sup> jarcento, kiam ili verkis la faman Konstitucion de 1912, kiu estis nuligita du jarojn kaj du monatojn poste. De tiam formale civitanoj aperis denove en Hispanio dum la respublikoj de 1876 kaj 1931, dum unu kaj ses jaroj respektive. Poste denove estis subuloj sub la reĝimo de Generalo Franko, ĝis kiam la Konstitucio de 1978 denove difinis hispanojn kiel civitanojn. Sekve, homoj neniam estis sendependaj en Hispanio, ĉu en Katalunio, ĉu alikloke. Oni povas diskuti, certe, ĉu parto de Hispanio povas sendependiĝi el la cetera lando, ĉu ne.

Oni ne devas, tamen fari tion supraĵe, ĉar gravaj sekvoj venos por Katalunio kaj ankaŭ por la cetera parto de Hispanio. Dekomence, la merkato por katalunaj varoj estas ĉefe la cetera parto de Hispanio. Nun oni povas libere aĉeti varojn produktitajn en Katalunio, sed se ĝi sendependiĝus, oni devus pagi enlandigan impoŝton, kaj tio plialtigus ilin, favore al samaj varoj de la ceteraj partoj de Eŭropo, kiuj ne pagus tiun impoŝton. La cetera parto de Hispanio perdus valuton, certe, ĉar Katalunio estas granda parto de lando, kaj ankaŭ ĝi havas riĉecon kaj turismon. Sed estas fakto, ke ĝi prenas pli da mono de Hispanio ol ĝi redonas, male al tio,

kion politikistoj sendependismaj, kiel Puĉdemont kaj Mas, kiujn vi povas vidi en la foto de paĝo 7<sup>a</sup>, asertas. Estas slogano de jaroj ripetita, Hispanio rabas al ni!, kiu estas falsa. Oni rabas en Katalunio, certe, sed tion ne faras Hispanio, sed kelkaj katalunaj politikistoj, kiuj nun respondecas antaŭ juĝistoj, eĉ se ili cinike diras, ke persekuti ilin estas persekuti Katalunion.

Mi estis ŝokita pri la senhonesteco de Arturo Mas, kiam li diris, ke ili korektis la rezulton de la voĉoj per interpartiaj paktoj. Oni devas korekti nenion, sed solvi la problemojn de civitanoj. Sed tiuj politikistoj soifas tiom multe pri povo, kiun ili poste misuzas, ke ili ne konscias pri la stulteco de multaj el siaj diraĵoj.

Mi memoras, ke la lastan fojon, kiam mi vizitis Barselonon, mi vidis, ke ĉiuj avertoj estis skribitaj en la kataluna lingvo, sed tamen neniu parolis ĝin surstrate: mi nur aŭdis la hispanan. Mi eltiris el tio, ke la katalunismecon kulturis nur politikistoj kaj ne la popolo. Kiel ie ajn en Hispanio, la popolo estas ideologiita de politikistoj pere de la edukado, uzata kiel armilo. Tamen, la civitanoj estas pli lertaj, kaj ili preferas uzi lingvon, kiun komprenas multe pli da homoj en la mondo. Hodiaŭ endas unuiĝi, ne apartiĝi, ĉar komunajn problemojn oni devas solvi pli bone se oni estas multaj homoj, ol se oni estas nur malmultaj apartigitaj de rivero aŭ monto. Sendependismo estas malsolidareco, kaj revo de istempoj, kiun politikistoj deziras revivigi ĉar ili preferas esti kapo de muso anstataŭ vosto de leono.



## Demografia vintro kaj Tergloba Krizo

### Ekonduko.

**P**ost 50 jaroj de manipulado pri la mitoj de la troloĝateco, oni konstatas, ke la homaro trairas procezon de maljuniĝo, kaj en la jaro 2050<sup>a</sup>, se tia ĉi evoluo daŭrigas, Hispanio —posedanta indicon sub 1.2 de filoj po ĉiu virino— estos la unua de la rangolisto.

La penoj de la grandaj regopovoĵoj por limigi la loĝatecon, kaj ĉefe tiun de la malriĉulaj tavoloj, ruinigis la mondan demografion. La tiel nomita demografia bombo estas elpenaĵo de la majstroj de la transnacia imperiismo celanta foreviti, ke sufiĉe granda kresko de la loĝantaro minacu la interesojn de la kontentigitoj. La kontentigitoj maskis, diskonitigs, kaj pli efike diskonigas la timigilon de la demografia bombo, kiel la ĉefan minacon kontraŭ la ekonomia progreso kaj la medion. Tiu-cele utilas al ili la ekonomika teorio de Malthus [ˈmaltus], kiu taŭgas al ili kiel sciencan fundamenton. La klimatiŝanĝon ili ankaŭ uzas kiel argumenton. Tial ili uzis maltusanismon\* kiel ĉefan moton



de ĉiuj siaj kampanjoj pri naskolimigo kaj naskiga saneco. La progresema maldekstrularo ankaŭ uzadas tiujn konceptojn kvaŝaŭ lancopikilon koincide kun la imperiisma koordinato.

La blindeco fratmortiga de la progreso, kiun ili deziregis al ni, havis klaran propekan kapron: la longantecon, ĉefe tiun de la malriĉaj landoj. Oni kaŝigis al ni la fakton, ke la ekonomia evoluo okazinta, kaj plue okazanta, en ĉiuj lando elirintaj el la mizero, estas ĝuste rezultato de la kresko de ties loĝantaroj.

La postsekvoj de tia ĉi kontraŭnaskiga pensmaniero montriĝas nun kiel tre realan minacon per si mem. En la ekonomia flanko la perspektivo estas simple ruinoza. La

Eŭropa Unuiĝo jam postulis kvindek milionojn da enmigrintoj por la proksimaj venontaj jaroj se ni volas satigi niajn necesojn de varoj kaj servoj. socie ni estas destinitaj al katastrofo. Reduktadas ĉia ajn ŝanco de estonta komforto.

En la morala sfero, la fenomeno suspektigas nin ion mute pli

\* Doktrino, kiu asertas, ke oni nepre bremsu la loĝadokreskon por eviti mondan ruinion, ĉar dum la varoproduktado iras laŭ aritmetika progresio, la loĝantaro uras laŭ geometria (t.e. multe pli rapide)

profundan: timon, elreviĝon, maloptimismon kaj malesperon. Tial, kontraŭ tiu ĉi imperiismo, kiu situas la kapitalon super la personon, oni nepre pluasertu, ke la supera riĉeco de la nacioj estas ties personoj. Sen personoj nenio havas sencon.

## Ĉu eksplodo aŭ implodo demografiaj? Efikoj de la kontraŭnaskigaj politikoj.

La efikoj estas malegale distribuitaj disde la mondo. En Eŭropo —ekseptinte Rusion— la demografiaj indicoj ne flatas ies sensojn: dum la naskindico rangas 10 po mil, tiu de mortoj estas 11 po mil, t.e. Eŭropo havas nete negativan gentokreskon. Dum la averaĝa fekundeco estas de 1.4 beboj po ĉiu virino, la minimuma cifero por plena generacia remeto rangas 2.1. Hispanio kaj Italio havas preskaŭ la plej malaltajn fekundindicoj el la mondo: 1.2. Tio estas, las redukto de la gentonombro jam estas realo, kaj nur la enmigrado evitis ĝis nun socian hekatombon.

Tiu ĉi "demografia vintro" estigis, ke en Eŭropo la koeficiento de laboristoj po pensiumitoj (nelaborantoj) estas rimarkinde modifita. Ekzemple, en Hispanio la ekvilibro komencos rompiĝi favore al pensiumitoj en la jaro 2020<sup>a</sup>, kiam ĉi--lando kalkulos kun ok milionoj da emerituloj, el kiuj du milionoj estos pli ol 80-jaraĝaj. Konklude, la pensia sistemo estos pli kaj pli socie peza, kaj fine estos finance nesubtenebla, se dum tiu periodo

ne alvenos fortaj enmigrantfluo.

Nuntempe la problemaro de la gentomaljuniĝo estas pli akra en la evoluantaj landoj, kies potencaj ekonomiaj sistemoj iel sukcesis mildigi la efikojn de lamaljuniĝo. Tamen, jam kelkaj evoluantaj landoj —kies strukturoj ne kapablas alfronti la fiefikojn de la maljuniĝo— jam komencis suferi tiujn, rezulte de la aplikado de kontraŭnaskigaj politikoj.

Tre evoluinta Japanio, kun fekundindico da 1.2, jam eniris en la maljuniĝadon, kvankam sia ekonomia strukturo kiel dua ekonomia potenco el la mondo (aŭ la 3<sup>a</sup>, akorde kun la lastaj ekonomiaj raportoj: post Usono kaj Ĉinio) kaj ĝuante tre altan familian ŝparkapablon (ĉirkaŭ 40% el la familiaj elspezoj, averaĝe), ebligas la landon alfronti la problemaron kun optimismo. Aliflanke, Rusio, kun fekundindico de 1.1., aŭ Ĉinio, kun 1.8, suferos pli akre la fiefikojn de la maljuniĝo. La ĉina logantaro devos alfronti, en proksimaj jaroj, la defiojn akcepti tri cent milionojn da personoj pli el 65-jaraĝaj. Tre konsiderinda parto el tiuj emerituloj estos bredintaj solan bebon (en siaj vivoj), pro la striktaj naskolimigaj leĝoj aplikitaj de la sinsekvaj autoritatoj, kaj la ŝarĝon de tiuj maljunuloj povos pagi nek la familioj nek la ŝtato. Simile al Ĉinio okazos en Rusio, pro la superabundo de abortoj faritaj en la lastaj jardekoj malgraŭ la lastjaraj naskostimulaj helpoj, kune kun restriktaj je la abortaj leĝoj, adoptitaj de la

sinsekvaj ĉefministroj: Medvjedev kaj Putin.

Pli grava kaj ŝokiga estas la problemaro okazanta en landoj de Afriko. Kvankam nuntempe la tiukontinenta loĝantaro pli rapide kreskas ol en iu alia loko, oni antaŭvidas, ke en la jaro 2050<sup>a</sup> nur plu kreskos la loĝantaro en Niĝerio. Kelkaj familioj trompitaj de kontraŭnaskigaj kampanjoj de okcidentaj lobioj travivos malfacilaĵojn en ŝtatoj kie ne ekzistas pensiajn sistemojn kaj ili preskaŭ ne havas parencojn, kiuj subtenos ilin en sia maljunaĝo, ĉar malaperis la familiaj multgeneraciaj modeloj (nuntempe kutimaj), kiuj konsistigus garantion de digna vivo en siaj lastaj jaroj, se ili plu ekzistus.

La kontraŭnaskigaj politikoj estas aplikintaj eraran principon: pensi, ke oni favoras la malriĉulojn per kuraĝigo de la naskolimigo. La malriĉuloj sen gefiloj iĝis pli malriĉaj. Kelkaj iniciatoj, kiel tiu de Bill Clinton [bil klintn] uzi 35 milionojn da dolaroj por favori la kontraŭnaskigon kaj aborton inter la plej malfavoritaj tavoloj de la loĝantaro, estas politika "miraĝo", kiu ne forigas la mariĉecon. Same, kiam UN estas farinte amasajn steriligojn al virinoj de Hindio kaj Peruo, ĝi estas kondamninta ilin vivi mizere en ties maljunaĝoj.

## Kialoj de la socia maljuniĝo.

Sendube, la maljuniĝo de la

loĝantaro estas anomalia artefarite estigita de politikoj de familia planado disvolvigitaj de diversajnaciaj kaj internaciaj organizaĵoj; kaj eĉ de privataj premgrupoj. Inter ili elstaras:

-UNESKO.

-Planned Parenthood [pland parenthud], (gepatreco planita).

-Catholic Women for the right to decide (katolikaj virinoj por la rajto decidi).

-Amnesty International (amnestio internacia).

-UNFPA-CNN (de la usonano Ted Turner).

Planned Parenthood donacas ĉiujare milionojn da dolaroj al UN por kuraĝigo de la aborto kaj la disvastigo de la uzo de kontraŭnaskigiloj. Ili ankaŭ skizis la solfilan politikon de Ĉinio.

Absurde estas plendi pri la efikoj de la monda maljuniĝo sen atenti la kialojn. Inter ili elstaras:

1 Aborto: en Rusio kaj Usono ili pli nombras ol la vivonaskoj.

2 Amasaj steriligoj: ok procento de la mondaj virinoj spertis, volonte aŭ nevolonte (eĉ perforte) steriligon.

3 La tre disvastigita uzo de kontraŭnaskigiloj: Ties uzo estas sufiĉe enradikigita en la seksaj kutimoj de la pli maljuniĝintaj

popoloj.

## La maltusanismaj politikoj kaŭzis kaj plilongigas la ekonomian globalan krizon.

La ekonomiistoj penadas kompreni kial la monda ekonomio plu langvoras post la globala krizo de la jaro 2008<sup>a</sup>. La usona periodaĵo Wall Steet Journal dediĉis sian ĉefan paĝon dum tuta semajno pritrakti kialon tiam subtaksitan: la disfalo de la fekundeco de la virinoj kaj, sekve, de la demografia kresko. Ili konkludis, ke en globaligita ekonomio, la demografio de ĉiu lando influas la ceterajn.

En la jaro 2012<sup>a</sup> la laborkapablaj tavoloj de la ĉefaj landekonomioj reduktiĝis unuafoje ekde 1950<sup>a</sup>: tio ĉi kalkulinte kun Rusio kaj Ĉinio. Unu kvarono el la monda loĝantaro situos en Afriko ĉirkaŭ la jaro 2050<sup>a</sup>, kaj 1.3 bilionoj da junuloj malpli ol 28-jaraĝaj konsistigos la mondan laborfoton. Kontraste, Eŭropo, kvankam urĝe bezonante eksterajn laboristojn por sia industrio, komencis pagi la afrikajn estrarojn por ke ili akceptu ties samlandanojn (kontraŭleĝe vivantaj en Eŭropo).

Afriko estas sufiĉe preterlasita de Orienta Azio rilate dungokreon kaj infrastrukturojn: kiel lernejojn kaj landvojojn. Preninte kiel ekzemplon al Niĝerio, tie nur naŭ procento el la plenkreskuloj havas plentagajn dungojn.

Ĉinio kapitaligis sian gigantan laborforton —la 2<sup>a</sup> plej granda post tiu de Usono— sed, post 3' jaroj de solfila politiko, la salajroj kreskis ege rimarkinde, tiel ke kelkaj multnaciaj entreprenoj translokiĝas en Afrikon serĉante la abundan kaj malmultekostan laboristaron kiun Ĉinio ne pli ofertas. Paralele, la tiea laboristaro komencis malkreski. Usono elmerĝas iom post iom kiel relativan venkinton de la konkurado, ĉar dum averaĝe la tavoloj laborkapablaj de la disvolviĝintaj landoj reduktiĝos po 26% ĝis la jaro 2050<sup>a</sup>, tiu de Usono kreskos po 10%, atingante 60% el la tuta kvanto de la disvolviĝintaj landoj (malpli, tamen, ol la nuna 66%). Tian venkon Usono ŝuldos al la enmigrintoj.

Aldone la diriton, oni esperas, ke ĉirkaŭ la jaro 2042<sup>a</sup>!, pro la demografiaj ŝanĝoj, la komerca deficito de Usono kun Ĉinio ŝanĝos sian signon (ĝi inversiĝos).

Ettore Gotti Tedeschi, ekonomikisto kaj iama prezidanto de IOR (ankaŭ nomita Banko de Vatikano), esprimis, ke: "la invitoj ne havi bebojn agas favore al la ekonomia krizo. La aŭguroj katastrofismaj de la radikalaj ekologiistoj neniam realiĝis: tute male, estis la disfalo de la naskoj en Usono, Eŭropo kaj Japanio; la devenigilo de la ekonomia krizo, samkiel de la blokado pri al investoj por savi la tergloban medion.

La aŭguroj maltusanismaj pri amasaj malsatmortoj en Azio —okazontaj dum la 70-aj jaroj de la 20aj jarcento se la loĝantaro plu kreskus tie je la sama rapida ritmo— pruvis esti tute eraraj. Male, estis ni, en la riĉa mondo, kiuj pro nia nula kresko malriĉiĝis dum ili —pli kaj pli nombraj— kreis tiom da riĉeco, ke jam estas en siaj manoj la usona ekstera ŝuldo. Ne estas vero, ke ju pli nombra estas la loĝantaro, des pli da personoj malsatas: tute male, kiam la loĝantaro stagnas, aŭ nur iomete kreskas, grandiĝas superproporcie la emeritula tavolo kaj, sekve, la konstanttaj kostoj plialtiĝas kaj ne eblas malpliigi la impoŝtojn, kio siavice blokigas la investojn, la disvolviĝon, kaj reduktas la ŝparadon. Fine, la familioj prunteprenas monon por antaŭpagi konzumojn, kaj, kiam ili ne plu kapablas pagi diligente, ili pigras kaj eksplodas ĉio.

La propono de la novaj maltusanoj stagnigi la naskoindicon kaj favori paralele ekonomian malkreskon estus —se sukcese sekvita— io katastrofa. La problemo de tiu skolo estas, ke ili malfidas sisteme pri la homo mem.

Laŭ papo Benedikto 16<sup>a</sup> esprimis en sia encikliko "Caritas in veritate": la devengilo de la mondaj krizoj, ĉu ekonomia, demografia aŭ ekologia, estas la senvalorigo de la homa vivo mem.

Denove S-ro Gotti Tedeschi, aludante la prelegon de papo

Benedikto 16<sup>a</sup> antaŭ FAO (UN-branĉo dediĉita al la agrokulturo kaj nutrado), asertis, ke Tero kapablas nutri ĉiujn, sed por fari veran ekonomion oni juste distribuu la rimedojn: "se mi havas monon kaj vi ne, al kiu mi vendos? Ne temas pri ĉarito, la riĉuloj nur pluriĉos, se la malriĉuloj enriĉiĝas". Jen natura ekonomika leĝo.

La plej granda ekonomikisto kaj demografiisto de nia tempo. S-ro Alfred Sauvy, klarigis kaj pruvis, ke ekzistas perfekta interrilato inter la kresko de la loĝantaro kaj la ekonomia disvolvo.

Kvankam S-ro Malthus, je 1798<sup>a</sup>, kaj la ekonomikisto Lester Thuron —antaŭ ne tiom longe— klopodis klarigi ke, cele al la plialtigo de MIP (t.e: malneta interna produktado kaj de varoj kaj de servoj) oni nepre reduktu la naskojn; aliflanke, S-ro Shumpeter kaj Solov rifuzis tiujn asertojn kaj proponis ĝuste la malan solvon, tio estas, kreskigi la numeratoron de la frakcio (la kreivan genion de la homo, kiu kapablas antaŭenigi la teknologion kaj sekve MIP-on) sen redukti la naskojn. UN mem agnoskis, ke de la jaro 1960<sup>a</sup> ĝis la jaro 2000<sup>a</sup> la monda logantaro kvarobliĝis, sed, samtempe, la monda MIP kreskis 40-oble.

Lastastempe, kaj profitante la polemikon pri la monda klimatŝanĝo, oni klopodas sugestii la ĝeneralan opiniantaron tiel ke ĝi konsideru la naskokreskon, la

patrinecon kaj la homon mem kiel kialojn de la detruo de la Tero. Pli kaj pli evidentiĝas, ke ekzistas kaj ege fortas mondscale tiaj premgrupoj (lobioj), kiuj revas kaj energie baraktas por transformi la mondon en ion similan al tiu de **Brave New World** (kuraĝa nova mondo, verko de Aldous Huxley), kalkulante kun klara strategio. Kiun profiton ili esperas atingi per sia baraktado, aŭ el kio konsistas sia strategio? Tio ĉi sufiĉus por soltema artikolo.

## Receptoj konkurantaj unuj kun aliaj.

Ekzistas du klasoj de receptoj por superi la mondajn krizojn: ĉu demografia, ĉu ekonomia. Ili havas malsamajn ilojn kaj antitezajn celojn. Mi klasifas ilin kiel:

A Kontraŭnombrigaj.

B Porpersonaj.

### A Kontraŭnombrigaj.

Tiuj ĉi estas fundamentitaj sur la tezo de Malthus kaj estas la motoj de la partianoj de NOM (Nova Ordo Monda). Ili strebas al la malpliigo de la monda loĝantaro (kelkaj NOManistoj postulas maksimuman loĝantaron da mil milionoj da homoj), samkiel de la fakturoj de la sociaj asekursistemoj —speciale tiujn de la emeritaj tavoloj— evitante la renversigon de la piramido de aĝotavoloj, kio plej trafas la

ekonomiojn ĉe la disvolviĝintaj landoj. Jen kelkaj el ili:

a/ **Socia eŭtanazio.**- Ĝi konsistas el la mortigo de la maljunuloj tro kostaj por la sociaj asekursistemoj de la disvolviĝintaj landoj: kvankam tio ĉi ŝajnas kiel scienca fikcio kaj inda de **Brave New World**, ĝi iom post iom kaj paŝopostpaŝe antaŭeniras brake de eŭtanaziaj leĝoj —pli kaj pli liberalaj—, kiuj lasas la primortan decidon al kuracistoj kiam ne estas klara la volo del a malsanulo. Kie oni metu la limon? Ĉio estas relativa, NOManistoj diras fiintence.

b/ **Plialtigo de la emeritaĝo.**- Jam en Japanio kaj en kelkaj eŭropaj landoj oni nur povas emeritiĝi post sia 67<sup>a</sup> jarigo.

c/ **Elmigrado en la disvolviĝintajn landojn.**- Jen facila aranĝo, ĝis nun praktikata, kaj provizore evitinta ekonomian katastrofon en la okcidentaj landoj: tamen, post du generacioj, la idoj de la enmigrintoj alproprigas la naskolimiĝajn kondutojn de la okcidentanoj kaj malaperas la profita efiko de la unua momento. Aliflanke, ĉar plejparte la enmigrintoj estas la junularo en siaj respektivaj landoj, ĉi fenomeno akcelas la maljuniĝon de la homsendintaj landoj, favoras la stagniĝon de ties ekonomioj, preskaŭ devigante al ili enŝuldiĝi al la MVF (Monĉa Valuta Fonduso). Konklude: **Ĝis neniam suvereneco!**

d/ **Kuraĝigo de la abortoj**

**mondskale.**- Kelkaj estraroj kaj intenaciaj lobioj premis (kaj ŝajne ili plu premos) al FAO kaj al UNESKO por ke tiuj laŭkondiĉigu siajn helpojn al la malriĉaj landoj, al la ekzisto en ili de la aborto kiel rajto leĝigita de la virinoj. Konklude: aborton aŭ malsa-ton! Ankaŭ, tiucele, Amnesty International denuncas antaŭ UN instancoj —kiel turmentantojn de virinoj— al la estraroj, kiuj malpermesas (aŭ ne sufiĉe permesas) la abortojn.

## B Porpersonaj.

Tiuj ĉi serĉas ebenigi la vojojn al mondo pli egala pri rajtoj, kie vivo estu agrabal kaj esperplena aventuro, ne suferplena loko kie oni —per grandaj ĉiutagaj penoj— sukcesas nur postvivi: **Mondon por personoj, ne la inverson!** Ju pli oni alproksimiĝos al la fina celo, des pli da stimuloj estos por naskigi abundajn bebojn, kaj, siavice, superi la ekonomian kaj ekologian krizojn. Jen kelkaj el ili:

a/ **Apogo al vera suvereneco de ĉiuj landoj:** ĉu financa, ĉu politika. Tiusence, la plifortiĝanta multpoluseco esprimata de regionaj aliancoj kiel Mercosur (sudamerika merkatalianco), BRICS (angla mallongigo de Brazilo-Rusio-Hinda Unuiĝo-Ĉinio-Sudafriko), Azia Banko por Disvolvado, ktp, ĉar tiuj ĉi povas efike konkurenci kun la imperiismaj instancoj.

b/ **Asigni la ĉefajn postenojn** de la agentejoj de Unuiĝintaj Nacioj

al personoj kompromitintaj kun la homa vivo, la apogo al la familioj, kaj kun la ĉiulanda suvereneco.

c/ **Firman apogon al justa komerco:** t.e., al justa retribuado de la produktistoj (speciale de tiuj vivantaj en malriĉaj landoj) malprofite al la peristoj, kaj starigon de meĥanismoj por stabiligi la prezojn de la krudaĵoj (petrolo, kafo, rizo, tritiko, kakao, arakisnuksoj), evitante, samtempe, spekulaciojn kiuj celas altigi la prezojn aŭ malaltigi ilin fiintence.

d/ **Klara kaj nepolitike kondiĉigita apogo de UN al tiuj landoj, kiuj estas trafataj de katastrofoj** klimataj, tertremoj, martremoj, tro longaj senpluvperiodoj, aŭ de tro pezaj priekologiaj elspezoj postulitaj de publikaj internaciaj instancoj. Ĉicele konsilindas la ekstariĝo de internacia publika asekursistemo, kiu aŭtomate respondu antaŭ tiaj eventoj, je peto de la koncernitaj estraroj. Ankaŭ, kiel ero de la apogsistemo menciita, la privataj ŝuldoj de la bankoj kaj estraroj de la damaĝitoj aŭtomate estu pardonataj, aŭ likvidataj je la kosto de asekura fonduso.

d/ **Ekvilibra rilato de la homaj socioj kun siaj naturaj medioj:** ni estu dankemaj pro la ŝanco de nia vivo mem kaj pro la medio, kiun ni ĝuas, kaj ni nreciproku: ĉu al la Universo, ĉu al Dio, laŭvole, per sentoj de interhoma solidareco kaj de respondeco pri tiaj donacoj. La kosmo sencelus se ne estus homoj, sed la homoj ne tiranu la kosmon. **Klarigo:** rilatoj de la homo al sia vivo kaj sian

medion egoisman aŭ malrespondece konzumavidan jam okazigis seriozajn malbonojn, tiel, kiel: reduktadon de la plureco biologia, klasbataon, malfavoran klimatsanĝon disde la terglobo, ekomonian krizon, kaj demografian vintron.

Pro sukcese atinti la ekvilibrantan rilaton antaŭe menciita necesos informistoj: kaj pro interreto kaj por ĵurnaloj kaj por radioj, televidoj, ktp; kiuj informos sendepende laŭvere, plene, sen-naciisme kaj akorde kun la pridetalita sinteno.

Sed oni ne estu naivaj. Eĉ kalkulante kun sufiĉaj tiaj informistoj, tio taŭgus por nenio se persistus la informaj monopoloj. Nepras leĝoj naciaj kaj internaciaj kontraŭ koncentriĝo de amaskomunikiloj en posedo de malmultaj karteloj.

f/ **Aranĝoj apoge al la familioj kaj al la homa vivo** (ekde la grave-diĝo ĝis sia natura fino) kaj kontraŭ aborto. Jen kelkaj:

1) **Eviti eŭtanazion per disvastigo de adekvataj sufermildigaj flegadoj** kaj psikologia agado apoge al la familianoj kaj al la malsanuloj mem.

2) **Restrikti** —kiom eble— **la abortajn leĝojn**: akompanante la restriktajn per helpoj al la gravedulinoj inklinaj aborti, kaj pro sociaj premoj kaj pro ties ekonomia nefirmeco.

3) **Apogi per publikaj rimedoj**

(ĉu naciaj, ĉu de UN) **kampanjojn** pri respekto al la homa vivo (en ĉiuj ties fazoj).

4) **Laboraranĝoj favore al la daŭra kaj facila kunvivado de la membroj de la familioj**: familiaj salajraj komplementoj, 35-hora (aŭ malpli) semajna laborkvanto —vidu ekzempleron n-ro 33<sup>a</sup> de *Kajeroj el la Sudo* (paĝo 11<sup>a</sup> aŭ <http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k33mall.htm>), ktp.

5) **Persekuti kaj forigi ĉiujn sklavecojn**: komercon pri virinoj, surrogatan patrinecon, laborojn trouzajn: senrajtaj kaj senkontraktaj.

6) **Instrui la loĝantaron, ekde la unuaj fazoj de sia lernado, rimarki la psikologiajn denskajn diferencojn inter viroj kaj virinoj** —por respekti ilin— kaj faciligi la reciprokajn konfidon, la fidelecon, la kompromitojn kaj la neperfortan intertrakton de siaj malhelpoj: evidente tio ĉi ege faciligus kaj stabiligus la estontajn familiajn rilatojn.

*Jozefo Pina Tuells.*

**Fontoj prikonsultitaj**: Friday Fax (C-Fam), Catholic.net, Carto pri la Tero, Brave New World, Encikliko "Laudato Si", Krestomatio de Sociala Katolika Doktrino, Autogestión (revuo), Russia Today News of the World.



## La faraono

Ĉapitro 42<sup>a</sup>

**L**aŭ konsilo de la astrologoj, la ĉefa parto de la armeo devis forlasi Pi-Baston la sepan de Hator, ĉar ĉi tiu tago estis

bona, bona, bona. La dioj en la ĉielo, kaj la homoj sur la tero ĝojis pro la venko de Ra je la malamikoj; ĉiu, kiu venis en la mondon en ĉi tiu tago, devos morti en malfrua maljuneco kaj ĉirkaŭita de respekto.

Tio estis ankaŭ tago favora por gravedaj virinoj kaj por komercistoj de teksaĵoj, malbona por ranoj kaj musoj.

De la momento, en kiu Ramzes ricevis la ĉefan komandon, li febre sin ĵetis al la laboro. Li mem akceptis ĉiun venantan regimenton, kontrolis la armilojn, vestojn kaj tendarojn. Li mem salutis la rekrutojn kaj instigis ilin al diligenteco en la manovroj por la pereigo de la malamikoj kaj por la gloro de la faraono. Li prezidis en ĉiu milita konsila kunveno, ĉeestis ĉe la esploro de ĉiu spiono, kaj ĉiun novaĵon pri la movado de la egiptaj armeoj kaj pri la situacio de la malamiko signis sur karto per propra mano.

Li tiel rapide pasis de unu loko al alia, ke atendata ĉie li tamen falis ĉiam, kvazaŭ akcipitro. Matene li estis sude de Pi-Bast, por revizii la nutraĵon; post unu horo li aperis norde de la urbo kaj malkovris, ke en la regimento leb mankas cent kvindek homoj. Ĉirkaŭ la vespero

li atingis la avangardon, vidis la transpason trans la brakon de Nilo kaj faris revuon de cent militaj veturiloj.



La sankta Mentezufis, kiu kiel rajtigito de Herhor bone konis la militan arton, ĉiumomente devis admiri lin.

—Vi scias —diris li al Sem kaj Mefres —ke mi ne amas la kronprincon, de l' tempo, kiam mi rimarkis liajn malbonecon kaj malsincerecon. Sed estu Oziriso mia atestanto, ke la junulo estas naskita generalo. Mi diros al vi aferon nekredeblan: ni kolektos niajn fortojn ĉe la limo tri aŭ kvar tagojn pli frue, ol oni povis supozi. Libianoj jam perdis la militon, kvankam ili ne aŭdis ankoraŭ la fajfon de niaj sagoj!...

—Tiom pli danĝera estas por ni tia faraono... —intermetis Mefres kun obstino, kiu karakterizas la maljunulojn.

Ĉirkaŭ la vespero, la sesan de

Hator, la princo Ramzes sin banis kaj anoncis al la stabo, ke morgaŭ du horojn antaŭ la leviĝo de l' suno oni ekiros.

—Kaj nun mi volas dormi —finis li.

Sed estis pli facile voli, ol dormi.

En la tuta urbo svarmis la soldatoj, kaj apud la palaco de la kronprinco estis la tendaro de regimento, kiu manĝis, trinkis kaj kantis, tute ne pensante pri la ripozo.

La princo foriris en la plej malproksiman ĉambron, sed eĉ tie li ne povis sin senvestigi. Ĉiminute alkuris iu adjutanto kun tute negrava raporto aŭ por peti ordonojn en demando, kiun li povus solvi mem. Oni alkondukis spionojn, kiuj alportis neniujn novaĵojn; venis grandaj sinjoroj kun malgranda sekvantaro, por proponi al la princo siajn servojn kiel memvoluloj. Insiste frapis feniciaj komercistoj, dezirante fari kontraktojn pri la liverado, aŭ liverantoj, plendantaj pri la postulemo de la generaloj.

Ne mankis eĉ antaŭdiristoj kaj astrologoj, kiuj en la lasta momento antaŭ la ekmarŝo volis fari horoskopojn al la princo, kaj sorĉistoj, kiuj havis fidindajn amuletojn kontraŭ la sagoj.

Ĉiuj ĉi homoj volis superforte penetri en la ĉambron de l' princo, ĉiu el ili opiniis, ke en sia mano li tenas la sorton de la milito kaj en tiaj cirkonstancoj la etiketo malaperas.

La kronprinco pacience akceptis ĉiujn, kiuj venis kun pli malpli gravaj aferoj. Sed kiam post

astrologo englitis en la ĉambron unu el la princaj virinoj kun riproĉo, ke verŝajne Ramzes ne amas ŝin plu, ĉar li ne adiaŭis ŝin, kaj kiam post kvaronhoro sub la fenestro aŭdiĝis ploroj de alia amatino, Ramzes perdis la paciencon.

Li alvokis Tutmozison kaj diris al li:

—Sidu en ĉi tiu ĉambro kaj, se tio plaĉas al vi, konsolu la virinojn de mia domo. Mi kaŝos min ie en la ĝardeno, ĉar alie mi ne ekdormos kaj morgaŭ mi havos aspekton de kokino, eltirita el putto.

—Kie mi devas serĉi vin en okazo de bezono? —demandis Tutmozis.

—Ne, ne!... —ridis la princo. —Nenie serĉu min. Mi mem min retrovos, kiam oni trumpetos la alarmon.

Dirante tion, la princo ĵetis sur la ŝultrojn mantelon kun kapuĉo kaj elglitis en la ĝardenon.

Sed ankaŭ en la ĝardeno svarmis soldatoj, kuiristaj knaboj kaj aliaj servistoj de la kronprinco; sur la tuta teritorio de la palaco malaperis la ordo, kiel ordinare antaŭ la ekmarŝo. Rimarkinte tion, Ramzes sin turnis en plej densan parton de la parko, trovis tie vinberan laŭbon kaj, kontenta, sin ĵetis sur benkon.

—Ĉi tie —murmuretis li —trovos min nek la pastroj, nek la virinoj.

Baldaŭ li ekdormis kiel ŝtono.

De kelke da tagoj la fenicino Kama sentis sin malsana. Al la incito aliĝis ia stranga malforteco kaj doloro en la artikoj. Krom tio

jukis ŝin la vizaĝo kaj precipe la frunto super la brovoj.

Ĉi tiuj malgravaj simptomoj tiel maltrankviligis ŝin, ke ŝi tute ĉesis timi, ke oni ŝin mortigos, sed anstataŭe ŝi sidis senĉese antaŭ la spegulo, permesinte al la servistoj fari kion ili volas, se ili lasos ŝin trankvila. En ĉi tiu momento ŝi pensis nek pri Ramzes, nek pri la malamata Sara; ŝian tutan atenton okupis la makuloj sur la frunto, kiujn ordinara okulo eĉ ne povus rimarki.

—Makulo... jes, estas makuloj...  
—diris ŝi al si, plena de timo.  
—Du... tri... Ho Astarte, vi ja ne volos tiamaniere puni vian pastrinon!... Pli bona estus la morto... Sed kia malsaĝaĵo!... Kiam mi frotas la fronton per la fingroj, la makuloj fariĝas pli ruĝaj... Sendube io ekmordis min, aŭ mi ŝmiris min per malpura oleo... Mi lavos min kaj morgaŭ la makuloj ne ekzistos plu...

Venis la morgaŭo, sed la makuloj ne malaperis.

Ŝi alvokis servistinon.

—Aŭskultu —diris ŝi —ekrigardu min.

Sed dirante tion, ŝi sidiĝis en la malpli lumigita parto de la ĉambro.

—Aŭskultu kaj rigardu...

—daŭrigis ŝi per sufokita voĉo.

—Ĉu...

Ĉu sur mia vizaĝo vi vidas iajn makulojn?... Sed... ne proksimiĝu!...

—Mi vidas nenion —respondis la servistino.

—Nek sub la maldekstra okulo?... nek super la brovoj?..

—demandis la fenicino, pli kaj pli incitita.

—Bonvolu turni, sinjorino, vian dian vizaĝon al la lumo —diris la servistino.

Kompreneble ĉi tiu postulo ĵetis Kaman en furiozon.

—For mizera!... —kriis ŝi —kaj ne montru vin al mi...

Kiam la servistino forkuris, ŝia sinjorino febre sin ĵetis al la spegulo kaj, malferminte kelke da potetoj, komencis ruĝe kolorigi sian vizaĝon per peniko.

Antaŭ la vespero, sentante senĉesan doloron en la artikoj kaj maltrankvilon pli grandan ol la doloro, ŝi ordonis alvoki kuraciston. Kiam oni diris al ŝi, ke li venis, ŝi ekrigardis la spegulon kaj ree atakis ŝin kvazaŭ furiozo. Ŝi ĵetis la spegulon sur la plankon kaj kriis kun ploro, ke ŝi ne volas kuraciston.

La tutan sesan de Hator ŝi manĝis nenion kaj volis vidi neniun:

Kiam post la subiro de l' suno eniris sklavino kun lumo, Kama kuŝiĝis sur la lito kaj ĉirkaŭvolvis la kapon per tuko. Ŝi ordonis al la sklavino foriri plej rapide sidiĝis en la apogseĝo malproksime de la torĉo kaj pasigis kelke da horoj en duondorma rigideco.

"Estas neniam makuloj —pensis ŝi —kaj se estas, ili ne estas tiuj... Tio ne estas la lepro..."

—Dioj!... —kriis ŝi, sin ĵetante sur la plankon —ne povas esti, ke mi... Dioj, savu!... Mi revenos en

la templon... mi pentofaros la tutan mian vivon...

Ŝi ree trankviliĝis kaj ree pensis:

"Ne, tio ne estas makuloj... De kelke da tagoj mi frotas mian haŭton kaj tial ĝi estas ruĝa... Ĉar kiel?... Ĉu oni aŭdis iam, ke pastrino kaj virino de la kronprinco povas malsaniĝi je la lepro?... Ho dioj, tio okazis neniam, de kiam ekzistas la mondo!... Nur la fiŝistoj, malliberuloj kaj mizeraj Hebreoj... Ho, tiu malnobla Hebreino, sur ŝin ĵetu la lepron vi, fortoj ĉielaj..."

En la sama momento en la fenestro de la unua etaĝo pasis ombro. Poste eksonis murmureto kaj de la korto en la mezon de la ĉambro ensaltis... la princo Ramzes.

Kama rigidiĝis. Subite ŝi kaptis sin je la kapo kaj senlima teruro larĝigis ŝiajn pupilojn.

—Likon?... —murmuretis ŝi  
—Likon, vi ĉi tie?... Vi pereos!... Oni persekutas vin...

—Mi scias —respondis la Greko, moke ridante. —Persekutas min ĉiuj Fenicianoj kaj la tuta polico de lia sankteco... Kaj tamen —aldonis li —mi estas ĉe vi kaj mi estis ĉe via sinjoro.

—Vi estis ĉe la princo?...

—Jes; en lia propra ĉambro... Kaj mi lasus ponardon en lia brusto, se malbonaj spiritoj ne estus lin forigintaj... Verŝajne via amanto iris al alia virino, ne al vi...

—Kion vi volas ĉi tie?... Forkuru!... —murmuretis Kama.

—Sed kun vi —estis lia respondo.

—En la strato atendas veturilo, en kiu ni atingos Nilon, kaj tie mia ŝipo...

—Ĉu vi freneziĝis?... La urbo kaj vojoj estas plenaj de soldatoj...

—Ĝuste tial mi povis eniri en la palacon kaj ni ambaŭ plej facile elglitos. Kolektu ĉiujn juvelojn... Mi tuj revenos kaj prenos vin.

—Kien vi iras?

—Mi serĉos vian sinjoron —respondis li. —Mi ja ne foriros, ne lasinte al li memoraĵon...

—Vi estas freneza...

—Silentu!... —interrompis li, pala de kolero. —Vi ankoraŭ volas lin defendi?...

La fenicino ekŝanceliĝis, kunpremis la pugnojn, en ŝiaj okuloj ekbrilis malbonsigna lumo.

—Kaj se vi ne trovos lin? —demandis ŝi.

—Mi mortigos kelke da dormantaj liaj soldatoj... mi metos fajron sub la palacon... Cetere, ĉu mi scias, kion mi faros?... Sed mi ne foriros, ne lasinte memoraĵon...

La grandaj okuloj de la fenicino havis tiel teruran esprimon, ke Likon ekmiris.

—Kio estas al vi? —demandis li.

—Nenio. Aŭskultu. Neniam vi estis tiel simila al la princo, kiel hodiaŭ!... Se do vi volas fari ion bonan...

Ŝi proksimigis la vizaĝon al lia orelo kaj komencis murmureti.

La Greko aŭskultis kun miro.

—Virino —diris li —la infero per vi parolas... Jes, la suspekto falos

sur lin!...

—Tio estas pli bona ol la ponardo  
—respondis ŝi kun rido. —Ĉu ne vere?...

—Neniam tia ideo venus en mian kapon!... Eble pli bone estus ilin ambaŭ?...

—Ne!... Ŝi vivu... Tio estos mia venĝo...

—Kia perfida animo!...  
—murmuretis Likon. —Sed vi plaĉas al mi... Ni reĝe pagos al ili...

Li iris al la fenestro kaj malaperis. Kama sin ekklinis por vidi lin kaj ekscitita aŭskultis, forgesinte pri si mem.

Eble kvaronon da horo post la foriro de Likon, de la figa arbareto eksonis terura virina krio. Ĝi ripetiĝis kelke da fojoj kaj eksilentis.

Anstataŭ ĝojo la Fenicianinon ekregis timo. Ŝi falis sur la genuojn kaj per frenezaj okuloj rigardis la malluman ĝardenon.

Malsupre eksonis mallaŭta kurado, ekkrakis kolono de la balkono kaj en la fenestro ree aperis Likon en nigra mantelo. Li vivege spiris, liaj manoj tremis.

—Kie estas la juveloj?...  
—murmuretis li.

—Lasu min trankvila —respondis ŝi.

La Greko kaptis ŝin je la nuko.

—Malnobla!... —diris li —ĉu vi ne komprenas, ke antaŭ kiam la suno leviĝos, oni malliberigos vin kaj sufokos post kelke da tagoj?...

—Mi estas malsana.

—Kie estas la juveloj?...

—Sub la lito.

Likon eniris en la ĉambron, ĉe la lumo de la torĉo eliris pezan kesteton, ĵetis sur Kaman mantelon kaj tiregis ŝin je la ŝultro.

—Venu. Kie estas la pordo, tra kiu eniras al vi tiu... tiu via sinjoro?...

—Lasu min...

La Greko sin klinis super ŝi kaj murmuretis:

—Jes!... vi pensas, ke mi lasos vin ĉi tie?... Hodiaŭ vi estas por mi kiel hundino, kiu perdis la flarkapablon... Sed vi devas sekvi min... Eksciu via sinjoro, ke estas iu pli bona ol li. Li ŝtelis pastrinon al diino; mi forprenas al li la amatinon...

—Mi diras al vi, ke mi estas malsana...

La Greko eliris maldikan ponardon kaj apogis ĝin sur ŝia nuko. Ŝi ektemis kaj murmuretis:

—Mi jam iras...

Tra la kaŝita pordo ili eliris en la ĝardenon. De la princa palaco flugis al ili murmurado de la soldatoj, kiuj bruligis fajrojn. Tie ĉi kaj tie, inter la arboj, oni vidis lumojn. De tempo al tempo pasis preter ili iu servisto de la kronprinco. En la pordego haltigis ilin la gardistoj.

—Kiu iras?

—Teboj —respondis Likon.

Sen malhelpo ili eliris kaj malaperis en la mallarĝaj stratetoj de la fremdula kvartalo de Pi-Bast.

Du horojn antaŭ la leviĝo de l' suno en la urbo eksonis trumpetoj kaj tamburoj.

Tutmozis kuŝis ankoraŭ en profunda dormo, kiam Ramzes fortiris de li la mantelon kaj ekkriis kun gaja rido:

—Leviĝu, vigla ĉefo!... La regimentoj jam ekmarŝis.

Tutmozis sidiĝis sur la lito kaj frotis la dormajn okulojn.

—Ah, tio estas vi, sinjoro?... —demandis li, oscedante. —Ĉu vi satdormis?

—Kiel neniam! —respondis la princo.

—Kaj mi, mi dormus ankoraŭ.

Ili ambaŭ sin banis, surmetis kamizolojn kaj duonkirasojn kaj sidiĝis sur la ĉevalojn, kiuj sin ŝiris el la manoj de la ĉevalistoj.

Tuj la kronprinco kun malgranda sekvantaro forlasis la urbon, preterpasante sur la vojo la kolonojn de la armeo, maldiligente marŝantaj. Nilo vaste disverŝis siajn akvojn, kaj la princo volis vidi persone la transiradon de la kanaloj kaj riveraj transirejoj.

Kiam la suno leviĝis, la lasta milita veturilo estis jam malproksime de la urbo, kaj la nobla nomarĥo de Pi-Bast parolis al siaj servistoj:

—Nun mi iras dormi, kaj ve al tiu, kiu vekos min antaŭ la vespera festeno! Eĉ la dia suno ripozas post ĉiu tago, kaj mi tute ne kuŝiĝis de la unua de Hator.

Apenaŭ li finis la laŭdon de sia vigleco, eniris polica oficiro kaj petis apartan aŭdiencon en tre grava afero.

—La tero englutu vin! —murmuretis la altrangulo.

Tamen li alvokis la oficiron kaj demandis malĝentile:

—Ĉu oni ne povas atendi kelke da horoj?... Nilo ja ne forkuras...

—Okazis granda malfeliĉo —respondis la oficiro. —La filo de la kronprinco estas mortigita...

—Kio?... kiu?... —kriis la nomarĥo.

—La filo de la Hebreino Sara.

—Kiu mortigis?... Kiam?...

—Hodiaŭ nokte.

—Sed kiu povis tion fari?...

La oficiro klinis la kapon kaj disetendis la manojn.

—Mi demandas, kiu mortigis?... —ripetis la altrangulo, pli terurita ol kolera.

—Bonvolu, sinjoro, mem fari la juĝan esploron. Mia buŝo ne ripetos tion, kion aŭdis miaj oreloj.

La teruro de la nomarĥo kreskis. Li ordonis alkonduki la servistojn de Sara kaj samtempe sendis al la ĉefpastro Mefres. Mentezufis, kiel reprezentanto de la milita ministro, forveturis kun la princo.

Mefres venis mirigita. La nomarĥo ripetis al li la novaĵon pri la mortigo kaj pri tio, ke la polica oficiro ne kuraĝas doni klarigojn.

—Estas atestantoj? —demandis la ĉefpastro.

—Ili atendas la ordonojn de via ekscelenco, sankta patro.

Oni enkondukis la pordiston de Sara.

—Ĉu vi aŭdis —demandis lin la

nomarĥo, —ke la infano de via sinjorino estas mortigita?

La homo falis sur la plankon kaj respondis:

—Mi eĉ vidis la noblajn restaĵojn, frakasitajn sur la muro, kaj mi haltigis nian sinjorinon, kiu krianta elkuris en la ĝardenon...

—Kiam tio okazis?

—Hodiaŭ post la noktomezo. Tuj post la alveno de nia glora princo al nia sinjorino... —respondis la pordisto. —

—Kiel, do la princo estis nokte ĉe via sinjorino? —demandis Mefres.

—Vi diris, granda profeto.

—Strange! —murmuretis Mefres al la nomarĥo.

La kuiristino de Sara estis la dua atestanto, la tria estis la ĉambristino. Ambaŭ certigis, ke post la noktomezo la kronprinco supreniris en la ĉambron de Sara. Li pasigis tie unu momenton, poste rapide elkuris en la ĝardenon, kaj tuj post li aperis la sinjorino Sara, terure kriante.

—Sed la kronprinco la tutan nokton ne eliris el sia ĉambro en la palaco... —diris la nomarĥo.

La polica oficiro ekbalancis la kapon kaj anoncis, ke en la antaŭĉambro atendas kelke da palacaj servistoj.

Oni alvokis ilin, la sankta Mefres donis al ili kelke da demandoj, kaj montriĝis, ke la kronprinco... ne dormis en la palaco. Li forlasis sian ĉambron antaŭ la noktomezo kaj eliris en la ĝardenon; li revenis, kiam eksonis la unuaj vekaj trumpetoj.

Kiam oni elkondukis la atestantojn, kaj la du altranguloj restis solaj, la nomarĥo kun ĝemo sin ĵetis sur la plankon, kaj antaŭsciigis Mefreson, ke li estas grave malsana kaj ke li preferas perdi la vivon, ol konduki la juĝan esploron. La ĉefpastro estis tre pala, tre emociita, sed li respondis ke oni devas klarigi la demandon pri la mortigo, kaj li ordonis al la nomarĥo, en la nomo de la faraono, iri kun li en la loĝejon de Sara.

La ĝardeno de la kronprinco estis proksime, kaj la du altranguloj baldaŭ atingis la lokon de la krimo. Enirinte en la ĉambron de la unua etaĝo, ili ekvidis Saran, genuantan ĉe la lulilo, en sintenado de virino, nutranta suĉinfanon. Sur la muroj kaj planko estis videblaj ruĝaj, sangaj makuloj.

La nomarĥo tiel malfortiĝis, ke li devis sidiĝi; Mefres estis trankvila. Li proksimiĝis al Sara, tuŝis ŝian ŝultron kaj demandis:

—Sinjorino, ni venas en la nomo de lia sankteco... Sara subite salte leviĝis, kaj ekvidinte Mefreson, kriis per terura voĉo:

—Malbeno al vi!... Vi volis havi hebrean reĝon, kaj jen la reĝo... Ho mi malfeliĉa, kial mi aŭskultis viajn perfidajn konsilojn...

Ŝi ŝanceliĝis, ree falis al la lulilo, ĝemante:

—Mia fileto... mia malgranda Seti!... Li estis tiel bela, tiel saĝa... Ankoraŭ antaŭ momento li etendis al mi la manetojn... Jehovo!... —ekkriis ŝi —redonu lin al mi... vi ja povas tion... Egiptaj

dioj, Oziriso... Horuso... Izido... Izido, vi ja mem estis patrino!... Ne eble estas, ke en la ĉielo neniu aŭskultos mian peton... Tiel eta infano... hieno ekkompatus lin...

La ĉefpastro prenis ŝin sub la brakoj kaj starigis sur la piedoj. La ĉambron plenigis la policanoj kaj servistoj.

—Sara —diris la ĉefpastro —en la nomo de lia sankteco la sinjoro de Egiptio mi postulas kaj ordonas, ke vi respondu: kiu mortigis vian filon?

Ŝi rigardis antaŭ si kvazaŭ freneza kaj frotis la frunton. La nomarĥo donis al ŝi akvon kun vino, kaj unu el la ĉeestantaj virinoj ŝprucigis sur ŝin vinagron.

—En la nomo de lia sankteco —ripetis Mefres —mi ordonas al vi, Sara, diri la nomon de la mortiginto...

La ĉeestantoj komencis repaŝi al la pordo, la nomarĥo per malespera movo ŝtopis al si la orelojn.

—Kiu mortigis?... —diris Sara per sufokita voĉo, dronigante la rigardon en la vizaĝo de Mefres. —Kiu mortigis, vi demandas?... Mi konas vin, pastroj!... Mi konas vian justecon...

—Kiu do?... —insistis Mefres.

—Mi!... —kriis Sara per nehoma voĉo. —Mi mortigis mian infanon pro tio, ke vi faris lin Hebreo.

—Tio estas malvero —siblis la ĉefpastro.

—Mi!... mi!... —ripetis Sara. —He, homoj, kiuj min vidas kaj aŭskultas —ŝi turnis sin al la atestantoj

—sciu, ke mi mortigis... mi... mi... mi!... —kriis ŝi, batante sian bruston.

Ĉe tiel klara memkulpigo la nomarĥo rekonsciiĝis kaj rigardis Saran kun kompato. La virinoj ploris, la pordisto viŝis la larmojn. Nur la sankta Mefres kunpremis la bluajn lipojn. Fine li diris per laŭta voĉo, rigardante la policajn oficistojn:

—Servistoj de lia sankteco, mi transdonas al vi ĉi tiun virinon, konduku ŝin al la juĝeja domo.

—Sed mia filo kun mi!... —interrompis Sara, sin ĵetante al la lulilo.

—Kun vi... kun vi, malfeliĉa virino —diris la nomarĥo kaj kovris sian vizaĝon.

La altranguloj eliris el la ĉambro. La polica oficiro ordonis alporti portilon kaj kun signoj de plej alta respekto kondukis Saran malsupren. La malfeliĉa patrino prenis el la lulilo la sange makulitan volvaĵon kaj sen kontraŭstaro sidiĝis en la portilon.

Ĉiuj servistoj sekvis ŝin ĝis la juĝeja domo.

Kiam Mefres kun la nomarĥo estis revenantaj hejmen tra la ĝardeno, la kortuŝita polica oficiro diris:

—Mi bedaŭras la virinon!...

—Juste ŝi estos punita... pro la mensogo —respondis la ĉefpastro!

—Via ekscelenco pensas...

—Mi estas certa, ke la dioj trovos kaj kondamnos la veran ulon...

Ĉe la pordeto de la ĝardeno baris



al ili la vojon la intendanto de la palaco de Kama, kriante:

—La fenicino forestas!... Ŝi malaperis en ĉi tiu nokto...

—Nova malfeliĉo... —murmuretis la nomarĥo.

—Ne timu —diris Mefres —ŝi sekvis la princon.

Per ĉi tiuj respondoj la nobla nomarĥo komprenis, ke la ĉefpastro malamas la princon, kaj la koro glaciĝis en li. Ĉar se oni pruvos al Ramzes, ke li mortigis la propran filon, la kronprinco neniam suriros la patran tronon, kaj la peza pastra jugo ankoraŭ pli forte premegos Egipton.

La malĝojo de la altrangulo pligrandiĝis, kiam oni diris al li vespere, ke du kuracistoj de la templo de Hator esplorinte la kadavron de la infano, esprimis la opinion, ke nur viro povis plenumi la mortigon. —Iu —diris ili —kaptis per la dekstra mano ambaŭ piedetojn de la knabo kaj frakasis lian kapon je la muro. La mano de Sara ne povus ĉirkaŭpreni ambaŭ piedetojn, sur kiuj cetere estis rekoneblaj postsignoj de grandaj fingroj.

Post ĉi tiu klarigo, la ĉefpastro Mefres, akompanata de Sem, iris en la malliberejon de Sara kaj en la nomo de ĉiuj egiptaj kaj fremdaj dioj ĵure petis ŝin, ke ŝi konfesu, ke ne ŝi estas kulpa pri la morto de infano, kaj ke ŝi priskribu, kian aspekton havis la krimulo.

—Ni kredos al viaj vortoj —diris Mefres —kaj vi tuj estos libera.

Sed Sara, anstataŭ esti tuŝita per tiaj pruvoj de bonvolo, terure

ekkoleris.

—Ŝakaloj —kriis ŝi —ne sufiĉas al vi du oferoj, vi deziras ankoraŭ novajn?... Mi tion faris, malfeliĉa, mi... ĉar kiu alia estus sufiĉe malnobla por mortigi infanon?... Malgrandan infanon, kiu malutilis neniun!..

—Ĉu vi scias, obstina virino, kio minacas vin? —demandis la sankta Mefres. —Tri tagojn vi tenos sur la brako la kadavron de via infano, kaj poste vi iros en malliberejon por dek kvin jaroj.

—Nur tri tagojn? —ripetis ŝi. —Sed mi, por la eterneco mi ne volas disiĝi de li, de mia malgranda Seti... Ne en la malliberejon, sed en la tombon mi iros kun li, kaj nia sinjoro ordonos kune nin enterigi.

Kiam la ĉefpastroj forlasis Saran, la plej pia Sem diris:

—Pli ol unu fojon mi vidis kaj juĝis patrinojn infanmortigintajn, sed neniun similis al tiu ĉi.

—Ĉar ŝi ne mortigis sian infanon —respondis kolere Mefres.

—Kiu do?...

—Tiu, kiun vidis la servistoj, kiam li enkuris en la domon de Sara kaj kiu forkuris post unu momento... Tiu, kiu marŝante kontraŭ la malamiko, prenis kun si la fenician pastrinon Kaman, kiu malpurigis la altaron... Tiu —finis la incitita Mefres —kiu forpelis el sia domo Saran, tial ke lia filo fariĝis Hebreo...

—Teruraj estas viaj vortoj! —respondis Sem kun timo.

—La krimo estas pli terura, kaj

malgraŭ la obstino de la malsaĝa Sara, ĝi estos malkovrita.

La sankta viro tute ne supozis, ke tre baldaŭ realiĝos lia profetaĵo.

Tio okazis jene:

La princo Ramzes, ekmarŝanta kun la armeo el Pi-Bast, ne forlasis ankoraŭ la palacon, kiam la poliestro jam sciis pri la mortigo de la infano de Sara, pri la forkuro de Kama kaj pri tio, ke la servistoj de Sara vidis la princon, enirantan nokte en ŝian domon. La poliestro estis homo inteligenta: li tuj divenis, kiu estis la mortiginto kaj, anstataŭ konduki la juĝan esploron sur la loko, li rapidis ekster la urbon persekuti la kulpajn, sciiginte pri ĉio al Hiram.

Kaj en la momento, kiam Mefres penis eltiri konfeson de Sara, la plej bonaj agentoj de la Pi-Basta polico, kaj ĉiuj Fenicianoj, komandataj de Hiram, jam persekutis la Grekon Likonon kaj la pastrinon Kaman.

En la tria nokto post la formarŝo de la princo, la poliestro revenis Pi-Baston, kondukante post si grandan, kovritan per tolo kaĝon, en kiu iu virino kriis kiel freneza: La poliestro ne iris dormi, sed tuj alvokis la oficiron, kiu kondukis la esploron kaj atente aŭskultis lian raporton.

Ĉe la leviĝo de la suno la du ĉefpastroj, Sem kaj Mefres, kaj la nomarĥo ricevis plej humilan alvokon tuj bonvole veni, se tia estos ilia deziro, al la poliestro. Ĉiuj tri kunvenis en la sama horo; la poliestro, profunde salutanta, komencis petegi, ke ili rakontu al

li ĉion, kion ili scias pri la mortigo de la infano de l' kronprinco.

La nomarĥo, kvankam granda altrangulo, paliĝis, aŭdante la humilan alvokon, kaj respondis, ke li scias nenion. Preskaŭ la samon ripetis la ĉefpastro Sem, aldonante personan opinion, ke Sara ŝajnas al li senkulpa. Kiam venis la vico de la sankta Mefres, li diris:

—Mi ne scias, ĉu via ekscelenco aŭdis, ke en la nokto, en kiu okazis la mortigo, forkuris unu el la princaj virinoj, nomata Kama?

La poliestro ŝajnis tre mirigita.

—Mi ne scias ankaŭ —daŭrigis Mefres —ĉu oni diris al via ekscelenco, ke la kronprinco ne pasigis la nokton en la palaco kaj ke li estis en la domo de Sara? La pordisto kaj du servistinoj rekonis lin, ĉar la nokto estis sufiĉe luma.

La miro de la poliestro ŝajnis atingi la plej altan gradon.

—Domaĝe estas —finis la ĉefpastro —ke dum kelke da tagoj vi forestis de Pi-Bast...

La poliestro profunde sin klinis antaŭ la ĉefpastro kaj turnis sin al la nomarĥo.

—Ĉu via honoro ne bonvolus favore diri al mi: kiel estis vestita la princo en tiu vespero?

—Li havis blankan tunikon kaj purpuran antaŭtukon, broditan per oraj franĝoj —respondis la nomarĥo. —Mi bone memoras, ĉar mi estis unu el la lastaj, kiuj parolis kun la princo en tiu vespero.

La poliestro klakfrapis la manojn kaj en la oficejon eniris la pordisto de Sara.

—Ĉu vi vidis la princon —demandis li —enirantan nokte en la domon de via sinjorino?

—Mi malfermis la pordeton al lia ekscelenco, li vivu eterne...

—Ĉu vi memoras, kiel li estis vestita?...

—Li havis tunikon kun flavaj kaj nigraj strioj, saman kufon kaj antaŭtukon, bluan kaj ruĝan —respondis la pordisto.

Nun ambaŭ pastroj kaj la nomarĥo komencis miri.

Kiam oni enkondukis, unu post la alia, ambaŭ servistinojn de Sara, kiuj detale ripetis la priskribon de la kostumo de l' kronprinco, la okuloj de la nomarĥo ekbrilis de ĝojo, kaj sur la vizaĝo de la sankta Mefres oni povis vidi konfuzon.

—Mi ĵuros —intermetis la nobla nomarĥo —ke la princo havis blankan tunikon kaj purpuran antaŭtukon kun oro...

—Kaj nun —diris la poliestro —bonvolu respektindaj iri kun mi en la malliberejon. Ni tie vidos ankoraŭ unu atestanton...

Ili malsupreniris en subteran salonon, kie apud la fenestro staris granda kaĝo, kovrita per tolo. La poliestro deĵetis la tolon per bastono kaj la ĉeestantoj ekvidis virinon, kuŝantan en angulo.

—Tio ja estas la sinjorino Kama!... —ekkriis la nomarĥo.

Efektive tio estis Kama, malsana

kaj tre ŝanĝita. Ekvidinte la altrangulojn, ŝi leviĝis kaj stariĝis en la lumo. Ŝia vizaĝo estis kovrita per kupraj makuloj. Ŝiaj okuloj estis kvazaŭ frenezaj.

—Kama, —diris la ĉefo de la polico —la diino Astarte frapis vin per la lepro.

—Ne la diino —respondis ŝi per aliigita voĉo. —Malnoblaj Azianoj ĵetis al mi venenitan vualon... Ho mi malfeliĉa!...

—Kama —daŭrigis la poliestro —vian mizeron ekkompatis niaj plej gloraj ĉefpastroj, la sanktaj Sem kaj Mefres. Se vi respondos la veron, ili preĝos por vi kaj eble la ĉiopova Oziriso deturnos de vi la malfeliĉegon. Estas ankoraŭ tempo, la malsano nur komenciĝas, kaj niaj dioj povas multon...

La malsana virino falis sur la genuojn kaj premante la vizaĝon al la kradoj, diris per rompita voĉo:

—Ekkompatu min... Mi forlasis la feniciajn diojn, kaj miajn servojn ĝis la fino de mia vivo mi oferos al la grandaj dioj de Egiptio... Sed forigu de mi...

—Respondu, sed la veron —demandis la poliestro —kaj la dioj ne rifuzos al vi sian favoron: kiu mortigis la infanon de la Hebreino Sara?

—La perfidulo Likon, Greko. Li estis kantisto de nia templo kaj diris, ke li amas min. Kaj nun li forlasis min, malnoblulo, propriginte al si miajn juvelojn!...

—Kial Likon mortigis la infanon?

—Li volis mortigi la princon, sed

ne trovinte lin en la palaco, li kuris en la domon de Sara kaj...

—Kiel la krimulo penetris en gardatan domon?

—Ĉu vi ne scias, sinjoro, ke Likon similas la princon?... Ili similas unu la alian kiel du folioj de la sama palmo...

—Kiel estis vestita Likon en tiu nokto? —demandis la poliestro.

—Li havis... li havis tunikon kun flavaj kaj nigraj strioj, saman kufon, kaj antaŭtukon, bluan kun nigro... Ne turmentu min plu... mi estos fidela al viaj dioj... Ĉu vi jam foriras?... Ho senkompataj!...

—Malfeliĉa virino —diris la ĉefpastro Sem —mi sendos al vi potencan mirakliston kaj eble...

—Benu vin Astarte... Ne, benu vin viaj dioj, ĉiopovaj kaj kompatemaj... —murmuretis la fenicino, rompita de la malsano.

La altranguloj eliris el la malliberejo kaj revenis en la oficejon. La nomarĥo, vidinte, ke la ĉefpastro Mefres havas senĉese mallevitajn okulojn kaj kunpremitajn lipojn, demandis lin:

—Ĉu vi ne ĝojas, sankta viro, de la miraklaj malkovroj, kiuj faris nia glora poliestro?...

—Mi ne havas kaŭzon por la ĝojo —respondis seke Mefres. —La afero, anstataŭ simpliĝi, komplikiĝas... Sara ja ĉiam ripetas, ke ŝi mortigis la infanon, kaj la fenicino respondas, kvazaŭ antaŭe instruita...

—Do via ekscelenco ne kredas?... —intermetis la poliestro.

—Ĉar mi vidis neniam du homojn

tiel similajn, ke oni povus preni unu anstataŭ alia. Tiom pli mi ne aŭdis, ke ekzistas en Pi-Bast homo, kiu povus ŝajnigi la kronprincon (li vivu eterne!...).

—Ĉi tiu homo estis en Pi-Bast, ĉe la templo de la diino Astarte. Konis lin la siria princo Hiram kaj la kronprinco vidis lin per sia propraj okuloj. Antaŭ ne longe li ordonis al mi kapti la Grekon kaj eĉ promesis altan rekompencan.

—Ho, ho!... —kriis Mefres. —Mi vidas, nobla poliestro, ke ĉirkaŭ vi komencas grupiĝi la plej grandaj sekretoj de la ŝtato. Permesu tamen, ke mi ne kredos je tiu Likon, ĝis mi mem ne vidos lin!...

Li kolere forlasis la oficejon, kaj post li la sankta Sem, levante la ŝultrojn.

Kiam en la koridoro eksilentis iliaj paŝoj, la nomarĥo, fikse rigardante la poliestron, demandis:

—Kio?...

—Vere —respondis la ĉefo —la sanktaj profetoj komencas sin miksi en la aferojn, kiuj neniam apartenis al ilia povo...

—Kaj ni devas toleri tion!... —murmuretis la nomarĥo.

—Ĝis venos la momento —sopiris la poliestro. —Ĉar, kiom mi konas la homajn korojn, ĉiuj militistoj kaj oficistoj de lia sankteco, la tuta aristokrataro indignas pro la despotismo de la pastroj. Ĉio devas havi finon...

—Vi diris grandajn vortojn —respondis la nomarĥo, premante lian manon —kaj ia interna voĉo parolas al mi, ke mi

ankoraŭ vidos vin la plej alta ĉefestro de la polico, ĉe la flanko de lia sankteco...

Ree pasis kelke da tagoj. La paraŝitoj dum tiu ĉi tempo sukcesis konservi de putriĝo la kadavron de la filo de Ramzes, kaj Sara estis ĉiam en la malliberejo, atendente la juĝon, certa, ke oni kondamnos ŝin.

Kama restis ankaŭ en la malliberejo, en kaĝo, ĉar oni timis ŝin, kiel malsanan je la lepro. Vizitis ŝin mirakla kuracisto, diris ĉe ŝi preĝojn kaj donis al ŝi por trinki akvon ĉioresanigan. Tamen la febro ne forlasis la Fenicianinon, kaj la kupraj makuloj super la brovoj kaj sur la vangoj fariĝis pli kaj pli klaraj. Tiam el la oficejo de la nomarĥo venis ordono forkonduki ŝin en la orientan dezerton, kie apartigita de homoj, ekzistis kolonio de lepruloj.

Foje vespere en la templon de Ptah venis la poliestro, dirante, ke li volas paroli kun la ĉefpastroj. La estro havis kun si du agentojn kaj homon vestitan per sako, de la piedoj ĝis la kapo.

Post momento oni respondis al li, ke la ĉefpastroj atendas lin en la sankta ĉambro, apud la statuo de la dio.

La poliestro lasis la agentojn ĉe la pordego, prenis je la ŝultro la homon vestitan per la sako, kaj kondukata de pastro iris en la sanktan ĉambron. Mefres kaj Sem estis en ĉefpastraj vestoj,

kun arĝentaj ladoj sur la brustoj.

Li falis antaŭ ili sur la plankon kaj diris:

—Konforme al via ordono, mi alkondukas al vi, sanktaj patroj, la krimulon Likonon. Ĉu vi volas vidi lian vizaĝon?

Kiam ili konsentis, la poliestro leviĝis kaj deŝiris la sakon de la homo, kiu akompanis lin.

Ambaŭ ĉefpastroj ekkriis de mirego. La Greko vere estis tiel simila al la kronprinco, ke oni ne povis kontraŭstari al la iluzio.

—Vi estas Likon, la kantisto de la templo de Astarte?...

—demandis la sankta Sem la Grekon, ligitan per ŝnuroj.

Likon malestime ekridetis.

—Vi mortigis la infanon de la princo?... —aldonis Mefres.

La Greko bluiĝis de kolero kaj penis deŝiri la ŝnurojn.

—Jes, mi mortigis la lupidon, ĉar mi ne povis trovi ĝian patron, la lupon... La fajro ĉiela bruligu lin!...

—Krimulo!... Kion faris al vi la princo? —demandis Sem kun indigno.

—Kion li faris?... Li forrabis al mi Kaman kaj enpuŝis ŝin en malsanon sen reveno... Mi estis libera, mi povis forkuri kun la vivo kaj riĉaĝo, sed mi decidis min venĝi, kaj jen vi havas min... Feliĉe por li, viaj dioj estas pli fortaj, ol mia malamo. Hodiaŭ vi povas min mortigi... Ju pli baldaŭ, des pli bone.

—Granda krimulo li estas —diris la ĉefpastro Sem.

Mefres silentis kaj fikse rigardis la flamajn okulojn de la Greko. Li admiris lian kuraĝon kaj meditis. Subite li diris al la poliestro:

—Vi povas foriri, nobla sinjoro; ĉi tiu homo apartenas al ni.

—Ĉi tiu homo —respondis la indignita estro —apartenas al mi... Mi kaptis lin kaj mi ricevos rekompencan de la kronprinco.

Mefres leviĝis kaj eliris oran medalon el sub la pastraj ornamoj.

—En la nomo de la plej alta kolegio, kies ano mi estas —diris Mefres —mi ordonas al vi transdoni ĉi tiun homon al ni. Memoru, ke lia ekzistado estas plej granda ŝtata sekreto kaj, vere, centfoje pli bone estos por vi, se vi tute forgesos, ke vi lasis lin ĉi tie...

La poliestro ree falis teren kaj eliris, sufokante la koleron.

—Repagos al vi tion nia sinjoro, la kronprinco —kiam li fariĝos faraono!... —pensis li. —Ankaŭ mi pagos mian parton, vi vidos.

La agentoj, starantaj ĉe la pordego, demandis lin: kie estas la malliberulo?...

—Sur la malliberulon —diris li —la dioj metis sian manon.

—Kaj nia rekompenco?... —nekuraĝe diris la pli aĝa agento.

—Ankaŭ sur vian rekompencan la dioj metis sian manon —respondis la estro. —Imagu do, ke vi sonĝis la malliberulon, kaj vi estos pli sendanĝeraj en via ofico

kaj sano.

La agentoj silentis kaj mallevis la kapojn. Sed en la koroj ili ĵuris venĝon al la pastroj, kiuj senigis ilin je tiel bela rekompenco.

Post la foriro de la poliestro, Mefres alvokis kelke da pastroj kaj al la plej maljuna murmuretis ion en la orelon. La pastroj ĉirkaŭis la Grekon kaj elkondukis lin el la sankta ĉambro. Likon ne kontraŭstaris.

—Mi pensas —diris Sem —ke ĉi tiu homo, kiel mortiginto, devas esti transdonita al la tribunalo.

—Neniam! —respondis firme Mefres. —Sur ĉi tiu homo pezas senkompare pli granda krimo: li similas la kronprincon.

—Kaj kion via ekscelenco faros kun li?

—Mi konservos lin por la plej alta kolegio —diris Mefres. —Tie, kie la kronprinco vizitas idolistajn templojn kaj ŝtelas el ili virinojn, kie la lando estas minacata de danĝera milito, kaj la pastra povo —de ribelo, tie Likon povas esti utila...

En la sekvinta tagmezo la ĉefpastro Sem, nomarĥo kaj poliestro venis en la malliberejon de Sara. La malfeliĉa ne manĝis de kelke da tagoj kaj estis tiel malforta, ke kiam ŝi ekvidis la altrangulojn, ŝi ne leviĝis de la benko.

—Sara —diris la nomarĥo, kiun ŝi konis antaŭe —ni alportas al vi bonan novaĵon.

—Novaĵon?... —ripetis ŝi apatie. —Mia filo ne vivas plu, jen estas

la novaĵo!... Miaj brustoj estas plenaj de lakto, sed mia koro estas ankoraŭ pli plena de malĝojo...

—Sara —daŭrigis la nomarĥo —vi estas libera. Ne vi mortigis la infanon.

Ŝiaj rigidaj trajtoj reviviĝis. Ŝi salte leviĝis de la benko kaj ekkriis:

—Mi... mi mortigis... nur mi!...

—Vian filon, atentu Sara, mortigis viro, Greko, nomata Likon, amanto de la fenicino Kama...

—Kion vi diras?... —murmuretis ŝi, kaptante liajn manojn. —Ah, tiu fenicino!... Mi sciis, ke ŝi pereigos nin... Sed la Greko?... Mi konas neniun Grekon... Cetere, kion povis fari al li mia filo...

—Mi ne scias —daŭrigis la

nomarĥo. —La Greko ne vivas plu. Sed atentu Sara: li estis tiel simila al la princo Ramzes, ke kiam li eniris en la ĉambron, vi pensis, ke tio estas nia sinjoro... Kaj vi preferis kulpigi vin mem, ol vian kaj nian sinjoron.

—Tio do ne estis Ramzes?... —kriis ŝi, kaptante sin je la kapo. —Kaj mi, mizera, mi permesis al fremda homo eltreni mian filon el la lulilo... Ha!... ha!... ha!...

Ŝi komencis ridi pli kaj pli mallaŭte. Subite, kvazaŭ io tranĉis ŝiajn kruojn, ŝi falis teren, svingis kelkfoje la manojn kaj mortis en rida eksplodo.

Sed sur ŝia vizaĝo restis esprimo de senfunda doloro, kiun ne povis forpeli eĉ la morto.

## ***La 24<sup>a</sup> Internacia Semajno de la Kulturo kaj Turismo***



**L**a 24<sup>a</sup> Internacia Semajno de la Kulturo kaj Turismo okazos en Cambrils, ĉe Hotelo Best Cambrils de la 2<sup>a</sup> ĝis la 9<sup>a</sup> de oktobro de 2016.

Dum la semajno okazos prelegoj

kaj kulturaj kaj turismaj vizitoj al ĉirkaŭaĵo. Ankaŭ oni donacos premion Ada Sikorska al kunant(in)o de elstara esperantist(in)o, kiu bone aktivis por Esperanto. Ada Sirkorska Fighiera estis kreinto de fama magazino ***Heroldo de Esperanto***.



# Kajeroj el la Sudo

Bulteno de Hispana Asocio  
de Laboristoj Esperantistaj



<http://www.gazetoteko.com/hale/k93.pdf>

## Enhavo

Redaktore.....	2
La kvar multoj .....	3
Politikaj partioj en Hispanio kaj demokratio .....	5
Kio okazas en Katalunio? ...	7
Demografia vintro kaj Tergloba Krizo .....	9
La Faraono, ĉ. 42 <sup>a</sup> .....	17
La 24 <sup>a</sup> ISKT .....	31

**Kovrilo:** La Kultura  
Kongreso de Katalunio  
2016 okazos en Cambrils.

**Pagmaniero:**

**Konto** **ES30 2100 4617 4122 0011 5275.**

**Notu vian nomon kaj la jaron, kiun vi pagas.**

**Poste, sendu noton al [kajeroj@gmail.com](mailto:kajeroj@gmail.com)**

Oni povas reprodukti la enhavon,  
kondiĉe, ke oni citu la originon.

Pri la enhavo de la artikoloj respon-  
decas la aŭtoro, ne la redakcio.

Ni ne korespondos pri nepetitaj  
artikoloj, kvankam ni klopodos  
publikigi ĉiun artikolon kies enhavo

Tute verkita kaj kompilita per  
senpagaj linuksaj rimedoj:  
OpenOffice Writer, Gimp kaj  
Scribus.

Depósito legal: Z-2398-88. Presejo: Copygraph.  
ISSN 1697-6460